



Only Peace Will Do La paco deklaro de Höchststadt

La paco deklaro de Höchststadt estis ellaborita okaze de la 1000-jariĝo de nia urbo surbaze de kontribuoj de infanoj kaj junuloj. Laŭ nia konvinko oni povas malebligi militajn batalojn, se oni konsideras la punktojn de ĉi tiu deklaro.

§ 1 Homa digno kaj homaj rajtoj

Ĉiuj homoj meritas la samajn rajtojn. Ni respektas kaj agnoskas homojn de fremda origino kaj de fremda religio. Ni primokas neniun, priridas neniun kaj ekskludas neniun.

§ 2 Baza provizo por ĉiuj homoj

Ni klopodas laŭpove, ke ĉiuj homoj disponas pri sufiĉe da akvo, nutraĵo, loĝejo kaj kuracado. Ni pledas por justa distribuo de laboro kaj por honesta salajro.

§ 3 Eduko kaj kulturo

Ni helpas ke ĉiuj infanoj de la mondo povas frekventi lernejon. Ĉiuj lernejoj eduku al toleremo kaj al homaneco. Ni subtenas kulturajn eventojn, kiuj intencas pripensadon kaj instigas pacemon. Ni abomenas eventojn kaj ludojn kiuj glorigas militon.

§ 4 Potenco kaj devigo

Ĉiuj sociaj grupoj rajtas demokratie partopreni politikajn decidojn. Politikistoj praktiku sian potencon nur pro amo al la homoj. Ni kontraŭas torturon, punon de morto kaj amasmurdilojn. Ĉiuj armiloj sur la mondo devas esti politike kontrolataj kaj fine anstataŭitaj per politikaj interkonsentoj.

§ 5 Amikeco kaj helpo

Ni helpas homojn en malriĉaj landoj, malfortulojn kaj handikapulojn. Ni ne silentas se ni rimarkas malpravecon. Ni subtenas ĝemeliĝojn de urboj kaj de landoj kaj interŝanĝon de lernantoj por konstrui kaj kutimigi amikecajn rilatojn kaj por krei komprenemon inter ĉiuj kulturoj.

§ 6 Religia konfeso kaj pardonemo

Ni preĝas, por ricevi forton por pardonemo. Dio ne respondecas pri milito. Ĉiuj homoj devas propre respondecite agi por paco.

§ 7 Privataj kontribuoj

Ni akceptas nian kunulon kiel samvaloran partneron. Ni klopodas ripari erarojn kaj kverelojn. Ni streĉas la fortojn por peti pardonon. Al malbona vorto ni ne respondas malbone, sed pardoneme.